4-a Jaro. N-o 180 APERAS  SEMAJNE 15. Marto 1928

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e Gvidanto: E. Lanty | SIDEJO de Ekzekutiva Komitato de SAT 23, rue Boyer, Paris-20e | ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27 Administranto: R. Lerchner

LA PARIZA KOMUNO

Kvindek-sep jaroj pasis depost la proklamo de la Pariza Komuno. Laŭ la kutimo la proletoj en Francio multnombre partoprenos baldaŭ en la solenoj kaj manifestacioj, okazontaj por memori la batalantojn de la revolucio, kiu estigis la Komunon je la 18-a de marto 1871. Ili vizitos la tombejojn, por surmeti funebrajn kronojn sur la komunanojn pafmortigitajn, la viktimojn de la "sanga semajno", kaj renovigos la ĵuran promeson lukti senĉese kaj senripoze ĝis la definitiva triumfo de la ideoj de tiuj herooj, ĝis la tuta efektivigo de la tasko, kiun ili postlasis al la Laboristaro.

Kial do la franca kaj la tutmonda Proletaro honoras la homojn de la Komuno kiel siajn pionirojn? El kio, do, konsistas la heredaĵo de la Komuno?



La Komuno naskiĝis el movado de la popolaj klasoj. Neniu antaŭe preparis ĝin konscie kaj sisteme. Malbonŝanca milito kontraŭ Germanio, la turmentoj de la sieĝo, senlaboreco ĉe la proletoj, malriĉiĝo de la etburĝaro, indigno de la popolo kontraŭ la altaj klasoj kaj la gvidantoj, kiuj sin montris nekapablaj, konfuza agitegiĝo en la Laboristaro nekontenta pri sia situacio kaj deziranta alian socian reĝimon: ĉiuj tiuj kaŭzoj kaj multaj aliaj instigis la Parizanojn al ribelo de la 18-a de marto, kiu laŭ neatendita maniero transirigis la regadon en la manojn de la "nacia gardistaro", la laborista klaso kaj la kun ĝi kunligita etburĝaro. Tio estis okazintaĵo neniam antaŭe vidita en la Historio. Ĝis tiam la regado estis tenita de bienhavuloj kaj kapitalistoj, kiuj per siaj fidinduloj formis tion, kion oni nomas "registaro".

Post la revolucio de l' 18-a de marto, kiam sub la ordono de Thiers (elp. Tiér) forveturis el Parizo kun liaj soldatoj la policistoj kaj oficistoj, la popolo restis sola estro de la situacio, kaj la regado transiris al la Proletaro.

Sed en la moderna socio, la Proletaro, ekonomie sklavigita de la Kapitalo, ne povas politike superregi, unue ne rompante la ĉenojn, per kiuj la Kapitalo katenas ĝin. Tial la movado de la Komuno devis akcepti la koloron de l' socialismo, la tendencon detrui la burĝaron, Kapitalon kaj la bazojn mem de la moderna socia reĝimo.

Komence, la movado estis konfuzega; tamen la laboristoj ludis la ĉefan rolon, precipe la metiistoj de Parizo, ĉe kiuj dum la lastaj jaroj la socialista propagando jam estis tre aktiva, kaj el kiuj multaj apartenis eĉ al la Internacio. Nur la laboristoj restis fidelaj al la respubliko ĝis la fino; la burĝaj respublikanoj kaj la etburĝaro de longtempe jam estis forlasintaj ĝin, timigitaj pro la socialista revolucia ĝia karaktero. Solaj, la proletoj luktis kaj mortis por la laborista regno, subtenante sian registaron, tio estas por la liberigo de la laborista klaso kaj por la bonstato de ĉiuj.

Forlasita de la hieraŭaj kunliganoj, la Komuno devis fatale malvenki. La tuta franca burĝaro, la bienhavuloj, fabrikestroj, grandaj kaj malgrandaj ŝtelistoj unuiĝis kontraŭ la Komuno. Tiu burĝa koalicio, mone helpita de Bismarck, kiu redonis centmil militkaptitojn al Thiers por plifaciligi la subpremon de la Pariza revolucio, sukcesis ribeligi la malklarajn kamparanojn kaj la provincan etburĝaron kontraŭ la pariza Proletaro kaj ĉirkaŭbari la duonon de Parizo, dum la alia duono estis gardata de la

germana armeo. En kelkaj grandaj urboj de Francio oni provis perforte preni la regadon, proklami la Komunon kaj aliri por helpi al Parizo. Sed tiuj provoj rapide fiaskis, kaj Parizo, kiu la unua estis levinta la standardon de la ribelo, estis forlasita al siaj propraj fortoj kaj kondamnita al neevitebla malgajno.

Post tio la ekzistado de la Komuno estas mallonga. Ĝi naskiĝis la 18-an de marto 1871 kaj mortis post du monatoj, la 29-an de majo. Kio precipe mankis al la Komuno, estas t e m p o : ĝi ne havis la tempon sin organizi nek realigi sian programon. Ĉiuflanke ĝi havis malamikojn, kiuj per ĉiuj rimedoj provis mortigi ĝin.

La Komuno proklamis la disigon de eklezio kaj ŝtato, laikigis la lernejajn metodojn, forigis la buĝeton de la religia kulto kaj per tio kompreneble kreis novajn malamikojn kontraŭ si. Ĝi ordonis detrui la kolonon de Vendôme, kiu montras la gloron de la fama krimulo Napoleono la unua. Tio okazis. La 6-an de aprilo ĝi ordonis bruligi la gilotinon, kaj ĉiuj proletoj ĝojis pro tiu bela homeca faro. Fine ĝi decidis konfide komisii la fabrikojn kaj laborejojn forlasitajn de siaj estroj al laboristaj societoj, por daŭrigi la produktadon.

Tiuj faktoj montras klare, ke la Komuno estis "morta danĝero" por la malnova ordo, starigita sur principoj de servado kaj ekspluatado. Kaj fine, kiam la armeoj de l' timemaĉa Napoleono la tria organizis hombuĉadon kontraŭ la ribelantoj ne sufiĉe preparitaj kaj malmultnombraj, tiuj lastaj nepre devis perdi la batalon post kelka tempo.

Tiam komenciĝis neimagebla buĉado. 30 000 Parizanoj estis pafmortigataj de la furiozaj soldataĉoj, 45 000 estis arestataj, miloj kaj miloj punekzilataj. Parizo perdis ĉirkaŭe 100 000 el siaj loĝantoj, inter ili la plej noblaj laboristoj ĉiuprofesiaj, inter ili Louise Michel, Julles Valles kaj multaj noblaj vivoj, kies nomojn ni ĉi tie ne povas citi unuope.

La herooj de la Komuno estu honorataj ne nur en Francio, sed de la tutmonda Proletaro, ĉar la Komuno luktis ne nacie, sed por la celo tutlaboristara en la mondo, por la liberigo de ĉiuj mizeruloj suferantaj. Ĝi pereis, ĝi nur estis ekflamanta lumsigno, sed ĝi montris al ni la vojon por la estonto. La Komuno devas vivi en ni mem.

M a r c e a u (7767).

R i m : La desegnaĵo estas speciale verkita por "S-ulo" de Pariza K-do.

La "Fundamento de Esperanto"[1]) devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta k o n t r o l i l o, kiu gardos lin de deflankiĝo de la vojo de unueco.

L. L. Zamenhof.

[1]) Mendebla ĉe nia Administrejo.

MORTINTO DE LA HUNGARIA PROLETARO

K-do E ŭ g e n o L a n d l e r, unu el la gvidantoj de la revolucia laborista movado en Hungario, mortis la 25-an de febr. 1928 en Francio. Jam depost du jaroj li havis seriozan kormalsanon, kiu antaŭ kelkaj semajnoj instigis lin veturi Francion, por resaniĝi. Depost la renversiĝo de la Hungaria Proleta Diktaturo en 1919 li vivis kiel politika rifuĝinto en Vieno, kaj oni atendis de li ankoraŭ multe da sukcesa laboro en batalo kontraŭ la blanka Horthy-Bethlen-reĝimo. Li ĝuis grandan sim-



Eŭgeno Landler

pation kaj estimon ĉe la hungaraj proletoj, kiujn li jam antaŭ 20 jaroj kiel advokato defendis antaŭ la klas-juĝistaro. En la jaro 1904, dum la ĝenerala fervojista striko, li pruvis sian kapablecon kiel organizanto kaj gvidanto. Poste li dum longaj jaroj laboris inter la fervojistoj, kies gvidanto li fariĝis. Dum la mondmilito li organizis fortan kontraŭmilitan movadon kaj pro tio estis enkarcerigata.

Dum la reĝimo burĝ-demokrata de Karolyi (1918) li jam tre vigle agitadis por la revolucia laborista movado. Tiutempe li fariĝis la gvidanto de la maldekstra opozicio en la Hungara Socialdemokrata Partio, kies membro li estis depost 13 jaroj. Li sindoneme laboris, por krei la proletan diktaturon, kaj fariĝis post la efektiviĝo de la Proleta Potenco dum la unuaj monatoj popolkomisaro por internaj aferoj. Sed kiam en danĝero estis la potenco, li same kiel la aliaj revoluciaj gvidantoj veturis al la batalfronto kaj akiris kiel komandanto de la 3-a korpuso de l' Hungaria Ruĝa Armeo venkon post venko kontraŭ la ĉeĥa imperialista armeo. Sur la norda batalfronto li dum kelkaj semajnoj per sia korpuso reakiris la plej grandajn urbojn okupitajn de la ĉeĥoj. Post la renverso de l' diktaturo li en Vieno organizis kaj gvidis la mallegalajn movadojn en Hungario. Li per sia lasta plej eta energio, penso kaj laboro nur servis la proletan movadon.

Pri esperanto K-do Landler ĉiam tre forte interesiĝis. Li estis informita pri SAT kaj konvinkita pri la grava rolo de mondlingvo en la servo de la tutmonda Proletaro, kaj li petis min, traduki la pli gravajn artikolojn el niaj presorganoj. Kelkfoje mi pruvis al li la praktikajn servojn de nia lingvo, legante al li leterojn ricevitajn de diverslandaj proletoj.

Por la hungaria kaj por la tutmonda Proletaro lia morto signifas gravan perdon. 246.



Antaŭ la balotoj en Polio

Kiam la legantoj ekvidos tiun ĉi artikolon, ili jam havos per la ĉiutagaj ĵurnaloj la rezultojn pri la balotoj en Polio. Tiuj ĉi linioj skizas la febran staton en la lando antaŭ la balottagoj, la 4-an kaj 11-an de marto.

La faŝista registaro penas per ĉiuj rimedoj fondi sejmon (parlamenton), en kiu troviĝu ĝia plimulto, por ke la diktatoro Pilsudski povu plue regi sen la kontraŭstaro de l' sejmo. Aliel li estus devigata, dispeli la parlamenton kaj regi sen ĝi. Sed "Avo" (dziadek — Pilsudski) volas ja trompi la Proletaron per la ŝajno, ke Polio estas demokrata lando!

Por gajni la voĉojn de la popolo, la registaro uzas ĉiujn leĝajn kaj malleĝajn rimedojn. Ĝi nuligis grandparte la listojn de la batalanta Laboristaro, de kamparanaro kaj eĉ de burĝaj alinacianoj (ne menciante la revoluciemajn fremdulojn).

Por la kelkaj veraj laboristaj listoj, kiuj — ho miraklo! — ne estas nuligitaj, oni nur rajtas voĉdoni, sed neniel agiti. Kunvenojn aranĝi estas nur permesate al partioj favoraj al la registaro. Aliaj kunvenoj estas dispelataj per la polico. Multe da junularo estas arestita nur pro gluado de afiŝoj aŭ pro pentrado de devizoj sur la muroj kiel: "Laboristoj, voĉdonu nur por ruĝuloj!"

La senmoraliĝo de la partioj, kiuj batalas inter si, estas netolerebla. Dum kunveno, kiu okazis en Opole, la "bund"anoj (judaj socialistoj) mortigis per tranĉiloj komunistan opozicianton. En alia kunveno okazinta en malgranda urbeto apud Lwów, cionistoj mortigis maljunan ortodoksulon, ĉar li ofendis unu el iliaj anoj. Interbatiĝoj partiaj okazas tre ofte. Dume la registaro uzas por sia agitado proklamojn, broŝurojn, kunvenojn, ilustraĵojn, radion, kinematografon ktp. Kaj krome ĝi aplikas la plej kruelan teroron. Arestoj kaj

politikaj procesoj estas preskaŭ ĉiutagaj aferoj. En Lodz oni kondamnis antaŭ tri semajnoj kelkajn laboristojn je karcero po 3,2 kaj 1 jaroj, pro partopreno en manifestacio kontraŭ industriisto. Antaŭ du semajnoj 6 lernantinoj estis kondamnataj pro suspekto pri komunismo. Pasintan semajnon oni kondamnis kelkajn junulojn je karcero po 4,3 kaj 2 jaroj, pro la denunco de la "bund"ano Toporek en la gazeto "Lodzer Weker".

La 23-an de februaro komenciĝis en Vilno granda proceso kontraŭ la malleĝa, blankrusia partio "Hromada". Pli ol 50 personoj estas kulpigitaj, inter kiuj troviĝas 4 blankrusiaj eksdeputitoj.

Malgraŭ la persekutoj tamen la registaro ne sukcesos atingi sian celon. La malkontenteco inter la laboranta amaso kreskas kun la senlaboreco, kareco kaj persekuto de la libera penso. La voĉdonado al la urbkonsilantaroj antaŭ kelkaj monatoj jam atestis la kreskantan konsciiĝon de la Laboristaro. Kaj ankaŭ nun, antaŭ la balotoj al sejmo kaj senato, aŭdiĝas tra tuta Polio la fortega voko de la malsata, subpremata kaj indignanta Proletaro: For la faŝismon!

Lodzano, 10 750.

LA SUPERREGADO DE L' DOLARO

S-ro R. M. Kenna, eks-ministro por la financoj de Grand-Britio, lastatempe asertis, ke Usono fariĝis la superreganto de l' mondo. Kaj tio okazas laŭ maniero multe pli reala ol tiu de la antikvaj superregadoj, starantaj sur milita bazo. Nun la Dolaro estras ĉiujn monajn valorojn en la mondo, eĉ la valoron de l' oro.

"Hodiaŭ, kiel antaŭmilite, diris la financisto, la prezo de l' oro en Usono estas fiksita, kaj ni emas pensi, ke la oro daŭrigas estri la valoron de l' dolaro. Sed tio ne plu korespondas al la realo.

Se difinita kvanto da oro povas ĉiam esti ŝanĝata por difinita nombro da dolaroj, la valoro de la oro tamen dependas de la aĉetpovo de la dolaro, kaj tiu aĉetpovo siavice dependas de la usona nivelo de la prezoj.

Se la nivelo de la prezoj en Usono varius laŭ la cirkulado de la oro, la aĉetpovo de la dolaro dependus ankoraŭ, kiel antaŭe, de la valoro de la oro. Sed ni scias, ke tiel ne plu estas. La usona nivelo de la prezoj ne estas influata de la ora cirkulado, sed ĝi estas kontrolata aŭ reguligata per la politiko de la rezervaj bankoj, laŭ tio ĉu ili plivastigas aŭ malplivastigas la krediton. Rezultas el tio, ke en Usono ne plu estas la valoro de la oro, kiu determinas la valoron de la dolaro, sed male estas la valoro de la dolaro, kiu determinas la valoron de la oro...

...Kvankam la oro daŭrigas esti la nominala bazo de la plejmulto el la monoj, la vera kaŭzo de la ŝanĝoj en la monda nivelo ĝenerala de la prezoj estas la aĉetpovo de la dolaro. Tia konstato trudas al ni jenan konkludon: La dolaro, ne la oro, estas hodiaŭ la bazo de la monda mono..."

Kaj la aŭtoritata financisto konfesas kun komprenebla bedaŭro, ke li ne vidas nuntempe perspektivon pri eventuala ŝanĝo en tia stato.

Kion ni konkludu el tiu fakto? Ĉu ni ankaŭ voku al la batalo kontraŭ la usona imperialismo? Ne. Ni opinias, ke tiaj flamaj alvokoj estas absolute vanaj. La Ekonomio havas siajn severajn, nekontraŭstareblajn leĝojn. En la nuntempa stadio de la produktofortoj, la ekonomio povas esti nur tutmonda. Nacia, sendependa ekonomio estas arĥaikaĵo, kiu pli kaj pli tendencas malaperi.

Oni nur trompas la laboristojn per alvokoj al nacia liberiĝo. Ili ne atentu, ĉu nacia aŭ eksternacia kapitalo ekspluatas ilin; ili prefere streĉu ĉiujn siajn fortojn por unuiĝi super la detruendaj landlimoj. Nur tiele ili akiros la forton por postuli pli kaj pli bonajn laborkaj vivkondiĉojn — atendante la tagon, kiam ili povas kapti la regadon en siajn manojn. Tiam ili ordigos la mondmastrumadon por la justa profito de ĉiuj laboruloj.

Unuvorte, la ekspluatata klaso devas lerni prikonsideri sian liberiĝon je sennacieca vidpunkto.

E. L.



Notoj el Britio

En Londono funkcias depost 1922 la Laborista Vetur-Asocio (W. T. A.), kun la celo organizi kaj ebligi veturadon eksterlanden de laboristaj grupoj. En la unua jaro nur 700 anoj partoprenis, sed en 1927 la asocio aranĝis libertempajn vojaĝojn por 14 000 personoj. La asocio laŭ sia regularo ne gajnas profiton kaj esperas, per reciproka vizitado, helpi al ĉiulandaj laboristoj pli kaj pli interkompreniĝi. La apliko de esperanto nun estas diskutata en ĝia ĵurnalo, kaj ĝi certe povas konsili al ĉiu K-do, kiu intencas viziti Brition. La adreso estas: Transport House, Smith Sq., London SW. 1.

Supernacia Valizo. Unu proponita solvo de la krizo en brita kapitalismo estas tiu, ke britoj aĉetu nur britajn varojn. La registaro elspezas multe da mono en reklamado — kaj samtempe (mallogike kiel kutime) malaltigas la salajrojn de la britaj laboristoj, kiuj ne povas vojaĝi eksterlanden kiel la riĉuloj kaj estroj, kiuj predikas patriotismon en la aĉetado. Ĉiu industrio volas havi protekton kontraŭ fremdula konkuro per enportimpostoj kaj per markoj, kiuj indikas la fremdan devenon. La speciala oficiala komitato de la registaro ĵus devis diskuti pri jena internacie miksita varo: Laboro el 10 landoj troviĝas en tualetvalizo: La kadro estas farita el norvega ligno, vendita en Danio; la kartono venis el Nederlando; la leda kovrilo estas preparita en Londono; la silka interna kovrilo en Manĉestro; la spegulo venis el Belgio, la brosoj el Germanio, dentbroso el Japanio kaj ungobroso el Francio. La kombilo estas itala, kaj ĉeĥoslovakaj boteloj fiksiĝis en ujoj faritaj en Birmingham. La katalogo tamen diras pretendeme, ke la valizo estas farita en Anglio! 488.



La Dürer-jaro Nürnberg 1928


La 6-an de aprilo 1928 estos la 400-jara datreveno de l' morto de unu el la plej granďaj artistoj de ĉiuj tempoj,



la pentristo Albrecht Dürer (Direr). La urbo Nürnberg festas lian memoron per serio de imponaj aranĝoj. Ĝi okazigos de aprilo ĝis septembro la "Dürer-jaron Nürnberg 1928". La ĉefpunkto de la aranĝoj estos unika, ankoraŭ neniam prezentita ekspozicio de originalverkoj de Dürer. Tiu prezento estos kadrumita de granda ekspozicio de germana arto, plue de kolekto de elektitaj trezoroj el la riĉa kulturposedaĵo de la Nürnberga urb-arkivo kaj urba biblioteko. Krome estas projektitaj serioj de paroladoj, festprezentadoj en la urba teatro, popularaj prezentadoj sur publikaj placoj ktp.

Mia vivo kaj buĝeto

Mi estas vilaĝa instruisto en blankrusa elementa lernejo, kiu troviĝas je 30 kilometroj de plej proksima urbo, je 10 kilometroj de poŝtejo, 7 kilometroj de kuracejo kaj vendejo. Mi montras la distancon, ĉar ĝi devigas min fari superfluan elspezon: lui veturilon. En la lernejo mi laboras 6 tagojn ĉiusemajne po 5 horoj. Mi havas 49 gelernantojn laŭ aĝo de 10 ĝis 15 jaroj kaj laŭ scioj — 2 grupoj (klasoj). Krom laboro en lernejo mi dediĉas ĉiutage preskaŭ 2 horojn por korektado de kajeroj, antaŭpreparado kaj lernejestraj laboroj. Dum la jaro mi havas, kiel ĉiu instruisto soveta, dumonatan someran forpermeson. Fakte mi havas ĉiam somere pli multe da libertagoj, ĉar, ekzemple, lastjare mi komencis la instruadon je 1-a de oktobro kaj finis ĝin la 24-an de majo, kun 10-taga vintra interrompo. Pro mia laboro mi ricevas, kiel salajro, monate 38 rublojn, loĝejon kun hejtaĵo kaj lumo (petrolo).



Mia loĝejo konsistas el 1 ĉambro kaj kuirejo. La domo iam apartenis al pastraĉaro, kun pajla tegmento, 5 malgrandaj fenestroj kaj 2 en kuirejo. Ĉar mi havas edzinon kaj 2 filetojn, mi neniel povas vivi per tiel malalta salajro. Tial mia edzino estas devigita ankaŭ labori. Ŝi estas instruistino en la sama lernejo, kie mi laboras kaj ricevas 37 rublojn monate.

Por varti la infanojn, dum ni laboras, ni havas hejmlaboristinon, kiu krom manĝado ricevas 6 rublojn monate. Enspezoj niaj nur estas niaj salajroj — 75 rubloj kaj lastjare monhelpo de asekuro, kiun ricevis mia edzino, kiam ŝi naskis — 16,20 rubloj, kaj post tio dum 9 monatoj ŝi daŭrigas ricevadi po 2,65 rubloj monate por nutrado de la infaneto.

Jen kiel aspektus nia buĝeto, se ni farus jaran bilancon:

Enspezoj:	Rubloj:
1. Mia salajro	456,—
2. Salajro de edzino . . .	444,—
3. Monhelpo de asekuro .	40,05
Sume:	940,05

Elspezoj:	Rubloj:	%
1. Dommastrumado . . .	600,—	63,9
2. Vestaĵoj, ŝuoj ktp. . . .	100,—	10,7
3. Hejmlaboristino	72,—	7,7
4. Veturado	30,—	3,3
5. Kuracado	10,—	1,1
6. Lavaĵo	11,50	1,3
7. Gazetoj, libroj	12,—	1,35
8. Sindikato, kaso de reciproka helpo	31,56	3,5
9. Esperanto (SAT k. ĉ. eld.)	17,50	2,0
10. Sociaj organizoj (IRH)	2,93	0,3
11. Radio, permesiloj k. c. .	10,—	1,1
12. Helpo al parencoj . . .	10,56	1,2
13. Diversaĵoj	12,—	1,35
14. Kaso por ŝparado . . .	20,—	1,2
Sume:	940,05	100,0

Enmeti iom da monrimedoj por ni estas necese, ĉar havante tiajn malgrandajn enspezojn, ni devas fari provizeton, por korekti nesingardan paŝon en elspezoj kaj por havi malgrandan monhelpon, se mia edzino estos devigata lasi instruadon pro la infanoj.

Certe per tiaj malgrandaj rimedoj ni ne ŝparos por nia maljuneco aŭ por "nigraj tagoj", sed tio ja ne estas urĝe necesa, ĉar kvankam mi neniom pagas al specialaj institutoj, al ni, kiel al instruistoj, post 25 jaroj de laboro oni donos pension.

Estas tute klare, ke ni estas tre malriĉaj, kiam du salajroj — mia kaj tiu de mia edzino, donas nur vivon sen ia komforto. Se ni ne antaŭvidus ian plibonigon, se ni ne sentus ĉiujaran sanigadon de nia buĝeto[1]), se ni ne vidus ĉiam pligrandiĝantan atenton al ni, se en niaj oreloj ne sonus la vortoj de nia gvidinto Lenin, kiu diris, ke soveta instruisto staros je tia alteco, je kia li neniam staris kaj staros en burĝaj landoj, ni eble malesperus. Sed 2—3 jarojn malantaŭen ni havis buĝeton duoble malaltan. Nur antaŭenrigardado, nur ĉiama kontakto kun vilaĝaj masoj, kiuj vivas ankoraŭ pli malriĉe, nur ĉiumonata evoluo de soveta mastrumado donas al ni viglecon en nia laboro. Ja de nia laboro, de lernejoj dependas parte bonstato de la laboruloj kaj sekve bonstato de ni mem.

S A T - a n o (6351).

[1]) Komencante de oktobro nia salajro ankoraŭ pligrandiĝos, sed mi ankoraŭ ne ĝuste scias, kia ĝi estos.

Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo

(Daŭrigo deksepa)

La Romanaj regantoj bezonis tian mistikon por firmigi sian potencon. La atingita unueco ja ne sin bazis sur la reala intereso de ĉiuj regatoj. Ekzistis klasoj. Kaj la tuta politiko de Romo sin apogis nur sur la aristokrata klaso. En ĉiuj konkeritaj landoj la demokrataj tendencoj estis severe subpremataj. La patriotisma religio estis do, kiel nuntempe, nepre necesa por trompi la ekspluatatan klason. Jam tiutempe aŭdiĝis akraj voĉoj, kiuj senmaskigis la trompon:

"La sovaĝaj bestoj posedas almenaŭ kuŝejon, dum tiuj, kiuj mortas pro la defendo de Italio ne havas alian bienon ol la aeron, kiun ili spiras. Sen tegmento por sin ŝirmi, ili vagas kun siaj edzinoj kaj infanoj. La generaloj trompe parolas, kiam ili instigas vin al batalo por defendo de viaj temploj, de viaj dioj, de la tomboj de viaj patroj. El tiom da Romanoj, ĉu estas unu, kiu havas sian hejman altaron kaj sian familian tombon? Vi batalas kaj mortas por krei la riĉegaĵon kaj lukson de aliuloj. Oni nomas vin mastroj de l' mondo, kaj vi ne posedas eĉ terbulon[31])."

Unu el la plej efikaj kaŭzoj de malekvilibro en la granda politika konstruo, kia estis la Romana Imperio, certe estis la ekzisto de klasoj inter si batalantaj. La ĉefaj kaŭzoj de disfalo kuŝis en la limoj mem de la Imperio. Dum tuta jarcento militoj okazis inter la pretendantoj al la imperia estreco. Kaj estas notinde, ke en tiuj militoj partoprenis pli grandaj kontingentoj ol en la militoj kontraŭ la Barbaroj. La Imperio sin mortigis mem; ĝia interna malfortiĝo antaŭis tiun de ĝiaj limoj, ĝi pereis precipe de siaj propraj vundoj kaj ne de eksteraj atakoj. Ne povis aliel okazi, ĉar ĝi reprezentis la plej grandan potencon en la mondo.

Oni ankaŭ ne devas forgesi, ke la submetiĝo de kelkaj popoloj estis nur ŝajna; la kredo, ke Romo estis nevenkebla, kaŭzis tiun submetiĝon. Kiam, kaŭze de interna malordo, foriĝis tiu kredo, indiĝenaj ĉefoj ribelis. Tiam, anstataŭ celi fariĝi imperiestroj, ili nur batalis por esti reĝoj en iu provinco.

La kultura unueco estis ankaŭ sufiĉe supraĵa. Ne ĉiuj regatoj, sed nur la aristokrataro bone scipovis la latinan lingvon. En la provincoj oni parolis la tiean dialekton[32]). Unuvorte, malestis la firmaj kondiĉoj necesaj por ĉiamigi politikan unuecon.

Sed, konsidere la tiutempajn kondiĉojn kaj cirkonstancojn, kiam ne ekzistis fervojoj, vaporŝipoj, presmaŝinoj kaj aliaj kulturiloj, oni ne povas ne admiri la grandiozan entreprenon de la antikvuloj. La Romana Imperio estas mirinda ekzemplo je volo, energio, lerteco kaj organizkapablo. Ĝia influo efikas ankoraŭ nuntempe en la jura kaj politika kampoj. Kio cetere estas bedaŭrinda, ĉar tio signifas influon de aristokrata koncepto pri rilatoj inter la homoj.

La ekzisto kaj malapero de tiu granda politika unuo trudas al ni jenajn konsiderojn:

Plej potenca politika konstruo, kiu sin bazas sur la ekspluatado de unu klaso kontraŭ alian estas ĉiam minacata je disfalo.

E. L a n t y.

(Pluo sekvos.)

[31]) T i b e r i o G r a k h o (m. 133 a. K.), citita de Plutarko.

[32]) La imperiestro Septimo-Severo naskiĝis en Tripolitanio. Kiam lia fratino venis al Romo por lin viziti, li estis tre hontigata pro tio, ke ŝi ne scipovis paroli latine.

SENNACIULA STUDENTA PAĜO

SUB LA KONTROLO DE STUDENTA FAKO, ORGANIZITA ĈE JUNULARA SEKCIO DE SAT

Redakcia adreso: Minsk, Poŝtkesto 33 (Sovetio), D. Snejko.

Denove alvoko!

Eĉ guto malgranda konstante frapante . . . L. Zamenhof.

Redaktejon alvenas leteroj, en kiuj K-doj skribas pri sia kontento je "SSP", sed bedaŭrindege malfeliĉa estas redaktoro, ĉar tiujn leterojn li ne povas utiligi por "SSP". Ni ja ne bezonas leterojn, esprimantajn kontenton, sed vi montru vian kontenton ekspedante artikolon al la redaktoro por nia paĝo. Same ni estas devigataj mallaŭdi Sovetian SAT-studentaron, kiu preskaŭ tute ne partoprenas en la laboro por nia "SSP" kaj nia Sekcio. Tamen oni volonte postulas de ni aperigon de korespond-anoncoj en nia paĝo.

Necesas pli aktive labori por SAT-studentsekcio, por "SSP". Ni ĝis nun ne unu respondon ricevis al niaj petoj en antaŭaj niaj paĝoj pri "Semajno el studenta vivo" kaj pri buĝeto de studento. Malmulte da leteroj alvenis al nia "interŝanĝejo".

Do, sufiĉas! Por sekvonta "SSP" — ni atendas respondon de ĉiuj studentoj, kiuj ajn tralegos ĉi tiun alvokon. "Eĉ guto malgranda, konstante — —". Leviĝos dormantoj ĝis nun . . .

D. S.

Studentaro je la servo de kapitalismo

Tiun ĉi leteron sendis al nia redaktejo ne esperantisto kaj ne SAT-ano (li certe SAT-aniĝos baldaŭ) — Leipzig-a studento. Hontu, SAT-studentoj! Red.

En marto 1928 finiĝos la tempo, kiam tarifa kontrakto de karbministoj en Supra Silezio ne plu validos. Tial, ke dum la pasinta jaro la reala salajro en Germanio tre malaltiĝis pro plialtigo de loĝeja prezo kaj impostoj sur pano kaj aliaj vivnecesaĵoj — estas atendata la batalo por plialtigi la salajron de karbministoj.

Kaj jam nun la minejposedantoj zorgas, por ke iliaj minejoj ne restu sen laboristoj. Ili jam nun interrilatas kun Studentaj Laboroficejoj kaj varbas studentojn por laborigi en minejoj dum marto kaj aprilo. En tiu tempo okazas libertempo en germanaj superaj lernejoj. Simila fakto estiĝis antaŭ nelonge en Dresdeno, kie strikis la fervojistoj. En tiuj okazoj la kapitalistoj jam ne turnas sin al la "TENO" (Technische Nothilfe = Teknika rezerva helpo), ĉar por uzi la servojn de tiu strikrompa organizo necesas speciala permeso de ministerio, kaj krom tio la interrilatoj kun tiu organizo povas nur pliakrigi la batalon. Do, vi povas imagi, kiel rilatas la laboristoj al tiu ĉi studentaro, kiu nur defendas la kapitalistojn. V. S-e.

Ne forgesu sendi artikolon por sekvonta "SSP"-Paĝo!

Studentaro en Ukrainio

Nur en 1921, post la definita venko ĉe la militfronto, Sovet-Ukrainio povis sufiĉe priatenti la proletarigon de l' supera lernejo. La sistemo de akcepto laŭ delegoj de laborulaj organizoj kaj la fondo de laboristaj fakultatoj komencis ĉi-tiun malfacilan procedon, kiu nun donis sukcesajn rezultojn. La proleta studentaro ricevas de la ŝtato konsiderindan helpon, kiu kreskas laŭ grado de la ekonomiaj progresoj: en 1922—23 estis distribuitaj 7150 stipendioj po 12 var-rubloj, en 1926—27 — 22 600 st. po 21 r. Nun 33% el la tuta studentaro ricevas stipendiojn, kaj la nombro da stipendiuloj samkiel la grando de l' stipendioj plue kreskos. La mizero, nesufiĉa instruitec-bazo, troŝarĝiteco per socia laboro ktp. grave malhelpas la studojn por la proletjunularo, sed la konscio pri neceso, konkiri la superan kvalifikon, helpas venki la barojn, kaj nun la nivelo de l' ĝenerala kulturo kaj de specialaj konoj proksimiĝas al la normo. Estas notinde, ke la proleta studentaro ne rompas la ligojn kun sia klaso: en la lernejo mem ĝi estas organizita laŭ sindikatoj (sindikataj kaj intersindikataj studentaj komitatoj anstataŭigis la malnovajn ĝeneralajn studentar-komitatojn) kaj aktive partoprenas en la vivo de la lastaj, samtempe preparante sin por la socialisma konstruado.

M. Zajdenberg.

TRA STUDENTIO

1 574 500 rubloj por studenta komunloĝejo

En lernjaro 1928/29 estos necese doni loĝejon por 1340 novaj studentoj. Por kontentigi ĉiujn novajn studentojn, necesos konstrui novan komunloĝejon. Popolkomisariaro de Edukado decidis konstrui en proksima lernjaro komunloĝejon por 1340 studentoj. Tiu ejo kostas 1 574 500 rublojn (2 rubl. = 1 dolaro). Oni jam komencis preparadon de konstru-materialo.

Nova ĵurnalo

En Germanio aperis nova studenta ĵurnalo "Student im Klassenkampf" (studento en klasbatalo), organo de komunistaj studentaj grupoj de Germanio.

El nia SSP

represis artikolon "Komunistaj Universitatoj": "Pravda"-Plzen (Ĉeĥosl.), "L'effort"-Lyon (Francio), "Mladeĵka duma"-Bulgario; represis artikolon "Studentaro en Bulg." kaj "Jugosl. Studentaro" la centra stud. organo de USSR "Ruĝa Studento". Krom tio kelkaj murgazetoj uzis nian materialon en Sovetiaj universitatoj. Ne forgesu havigi ekzempleron de gazeto al nia redaktejo.

Studentoj en la klasbatalo

Trafoliumante paĝojn pri revolucia historio en diversaj landoj kaj epokoj, ni trovas inter la plej entuziasmaj kaj sinoferemaj batalantoj por la liberiga movado ĉiam la studentaron. Hodiaŭ bedaŭrinde tiu honora tradicio de studentoj en multaj landoj estas malhonorigita; precipe en la landoj de burĝa demokratioj — Anglio, Aŭstrio, Francio, Germanio, Usono — ni trovas hodiaŭ la plej grandan parton de l' studentaro en la vicoj de la ekstreme naciistaj partioj kaj en la organizoj de strikrompado kaj faŝismo. Tamen pluvivas ankoraŭ nuntempe tiu honora revolucia tradicio de l' studentaro (kiu fondiĝis sur la barikadoj — 1848 en Germanio kaj Aŭstrio, 1905 en Rusio); ĝi elmontriĝas en la landoj balkanaj, en la "randŝtatoj" de l' Baltikumo, kaj en aliaj pli malpli per la blanka teroro regataj landoj, ne laste en Ĉinio, kie la revolucia rolo de la studentoj pli ol unu fojon evidentiĝis.

Antaŭ ni kuŝas ampleksa dokumento — tro granda, por trovi publikigon en "S-ulo" —, kiu atestas pri aktiva rolo de studentoj en la lastaj liberigaj bataloj de litova popolo kontraŭ ĝia diktatoro Voldemaras (dum sept. 1927 en Taŭroggen). Tuta aro da studentoj post la malsukcesa ribelo estis arestata kaj sidas en la malliberejoj de Kaŭnas, dum kelkiuj sukcesis forkuri al pola teritorio, de kie la studento P. Ancevičius direktas socialistan gazeton "Antaŭen", kies eldono estas malpermesata en la "patrio".

Tiel la studentoj fariĝas, kiel intelekte superaj al la cetera laborularo, ofte plej ardaj pioniroj en la liberiga batalo de l' laborista klaso. N. B.

STUDENTA SERVO

Komisiono por interrilatoj kun aliurbaj kaj alilandaj universitatoj ĉe Saratova Veterinara Instituto serĉas interrilatojn kun samfakaj studentoj. Skribu: Saratov (Sovetio), Ispolbjuro Veterinarnogo Instituta.

Al Studenta ĵurnalo "Krasnoje Studenĉestrio" (Moskvo, ul. Gercena 10) sendu materialojn kaj fotojn por uzi ilin en la ĵurnalo.

Interŝanĝado per medicinaj ĵurnaloj okazas per red. de SSP. Medicinstudentoj, sendu vialandajn ĵurnalojn kaj libretojn kaj skribu viajn dezirojn pri rekompenca ricevo.

NIA POSTO

Toulouse-aj SAT-anoj. Ĝis nun via respondo ne venis. Vi eĉ skribis al ni nenion pri Francia Konferenco Universitata (neŭtrala), kiu okazis en via urbo. Kial do?

357. — Ni atendas de vi jam longe vian materialon por nia paĝo. Ĉion senditan ni uzis. Dankon!

9543. Uŝakova. — Ni atendas vian artikolon responde al enketo pri medicina edukado. Nepre!

6725. — Ni atendas promesitan detalan artikolon pri konata al vi temo.

Ch. Despeyroux k. Rinkvan Ling — anoncu sin ĉe sekretariejo de nia sekcio.

3905. — Ni atendas respondon. Red.

Se estas por vi malfacile verki artikolon, sendu al redaktejo de nia "SSP" vian nacilingvan studentan jurnalon aŭ eltranĉu el gazetoj artikolojn pri studenta vivo.

K-doj el Blankaj landoj materialon por "SSP" sendu al nia Berlina adreso (K-do Muravkin). Red.

TRA ESPERANTIO

LETERO DE MAKSIM GORKIJ AL BLANKRUSIAJ ESPERANTISTOJ

Okaze de 35-jara jubileo de verkist-literatura laboro de Maksim Gorkij Blankrusia SEU-organizo elektis lin kiel honoran membron de sia organizo. Responde al sendita membrokarto kaj letero li sendis tiun ĉi leteron:

Estimataj K-doj!

La deziro krei lingvon komunan por ĉiuj homoj estis unu el tiuj tro bravaj ĝis frenezo — deziroj, kiuj ĉiam servis, nun servas kaj ĉiam servos al la afero de organizo de l' mondo laŭ la volo de l' homo kaj por senlima disvolvo de homaj kapablecoj.

Ne disputebla estas la fakto, ke, parolante per unu lingvo, la laborula homaro sufiĉe pli rapide komprenus la unuecon de siaj klas-interesoj.

Kontraŭ esperanto argumentas: ĝi estas artefarita lingvo, kaj lingvojn oni ne kreas arte. Mi ne scias, kiel oni kreis la lingvojn tiam, kiam la homo eksentis necesecon paroli; teorioj pri la deveno de parolo ŝajnas al mi ne tre kontentige klarigi ĉi tiun procezon. Al mi ŝajnas, ke ni, homoj, havas rajton diri: ĉio, kion ni nomas "kulturo", ĉia "dua naturo", kiu estas kreata per niaj scienco, tekniko, arto, vorto, — ĉio, kio forkondukas nin de bestoj — ĉio tio estas artefarita. Te-kulero — estas artefarita objekto same kiel tranĉilo, botoj, ĉaro, boato, aŭto, vaporŝipo, libro, muziko, bildo.

Al homo — kiel al besto — estas nature, sorbi aŭ trinki per plena mano, vagadi nuda, murmuregi, sed estas tute ne nature, elpensi Prometeon, Faŭston, Don-Kiĥoton.

Ni vivas en la domoj, urboj, inter objektoj faritaj per la forto de nia racio kaj imago, nia volo por ke nia vivo estu pli facila kaj agrabla. Se la homoj konscias la necesecon paroli per unu lingvo — tio ankaŭ estas plenumota. Ĉio sur la tero estas kreata per streĉo de nia volo, de nia imago, de nia racio. Homo devas sugestii al si mem: m i ĉ i o n p o v a s.

Ne necesas timi iujn kuraĝojn kaj frenezojn dum la kreado kaj laboro.

La plej granda kaj la plej valora el ĉio farita de homoj estas — scienco, arto, tekniko. Kaj unua, kaj dua, kaj tria — estas tute frenezaj.

Mia saluto

A. P e ŝ k o v.

S o r r e n t o, Italio, 6. febr. 1928.

Komunikite de D. S n e j k o.

EL LA REDAKTEJO

Okaze de la memorinda 18-a marto (Pariza Komuno) kaj samdata 5-jara jubileo de Internacia Ruĝa Helpo en Sovetio nin alflugis i. a. saluto de la "aktivularo" inter la "Junaj Amikoj de MOPR" (infanoj) en Ivanovo-Voznesensk al malliberaj revoluciuloj, kune kun bildo de l' grupo. Jes, karaj "junaj amikoj", se vi ĉiuj estus lernantoj de nia lingvo, eble legantoj de "La Lernanto" kaj "Petro", kaj multaj el viaj pliaĝaj K-doj junlaboristoj, abonantoj al "S-ulo" — ni povus meti vian foton, ĉar pli ampleksa tiam estus nia gazeto. Sed dum ni ankoraŭ nombras la progresojn de "S-ulo" laŭ dekoj da abonantoj, kaj ne laŭ centoj kaj miloj, — ni devas resti modestaj kaj paciencaj. Kaj niaj fervoraj propagandistoj en Iv.-Voznes. zorgu per sia senlaceco, ke ni povu plenumi iam la deziron de l' etuloj.

K-do 246 ne komprenas, kial ni aperigas materialon de li senditan nur post 4—10 semajnoj. Sed li ne forgesu, ke ni ne disponas ĉiutagan ĵurnalon, kiu sendube rapidigus la enpresojn, kaj ke krome en la plej multaj okazoj la materialo por semajna gazeto pli longe konservas sian aktualecon. Raportoj de ĉiutagaj gazetservoj ja ne utilas al ni.

Ni dankas al tiuj K-doj, kiuj sendis al ni bone legeblajn, zorge skribitajn (eĉ kelkfoje maŝinskribitajn) artikolojn. Ni esperas, ke multaj aliaj sekvos, komprenantaj, ke ili multe subtenas nin tiele en nia laboro. *N.B.*

8-a Kongreso de SAT
en Göteborg (Svedio)

(14—19. aŭgusto 1928)

Ĉion, kio rilatas al la kongreso adresu al: *Einar Adamson, Box 73, Göteborg, Svedio.*

6-a Komuniko



Kongresmarko farita laŭ desegnajo de K-do Gunnar Torstensson.

Kongresmarko en du koloroj. Mendu ĉe Kongresa Komitato la belajn kongresmarkojn. 100 markoj kostas 1 germ. markon aŭ ekvivalenton en alilanda mono. Pagon oni povas sendi per nacia bankbileto aŭ respondkuponoj. Ĉiu mendanto ricevas poste la grandan kongres-gazeton en sveda k. esp. lingvoj.

Granda Kongresafiŝo trikolora estas preta. Ĉiuj K-doj, kiuj volas afiŝi en kunvenoj, oficialaj domoj, vojaĝoficejoj, petu afiŝojn ĉe Kongr. Komitato. Ni sendos ilin senpage.

Kostoj de l' restado en Göteborg

L o ĝ e j o. La Kongr. Komitato esperis, ke ĝi havos okazon doni al ĉiuj senpagan loĝejon, privatan aŭ komunan. Ni ja ne ankoraŭ scias, kiel ni sukcesos ekonomie organizi la tuton, tial ni devas fiksi iun prezon. Multaj certe povos loĝi private ĉe esperantistoj aŭ ĉe profesikolegoj se ili skribos pri tio sian deziron ĝustatempe, ke ni havu sufiĉe da tempo por la aranĝoj. En komunaj loĝejoj ni decidis fiksi prezon je ½-a sveda krono — ĉirkaŭe 0.60 germ. marko — po nokto. Kalkulu mem laŭ via mono. La plikostojn la K. K. prizorgos. Por K-doj el tre malbonvalutaj landoj, ekzemple Francio, Estonio, Polio, Latvio ktp. ni provos fari specialajn aranĝojn, se ili esprimas tian deziron.

Kelkaj K-doj preferus hotelon. Bona hotelĉambro kostas ĉ. 4 ĝis 5 m. g. por unu persono, 6 ĝis 7 por du personoj. Sed ankaŭ ni eble sukcesos havigi hotelĉambrojn por 2½ mk. por unu persono, 4½ mk. por du, 6 mk. por tri. Sed precizaj prezoj tiurilate estas tre malfacile fikseblaj.

M a n ĝ a d o. Ni interkonsentis kun kelkaj restoracioj. Prezoj: Matenmanĝo aŭ vespermanĝo 1 g. m. ĝis 1.40. Tagmanĝo 1.25 ĝis 1.75 por relative bona manĝo. Unu kafejo donas ekzemple por 1 kr. sveda — 1.15 g. m. — kaĉon, lakton, 5—6 buterpanojn, 2 ovojn kaj kafon. Kompreneble la prezoj estas tre diferencaj. Oni povas havi pli- k. malplikoste ol ni notis.

Radio kaj Esperanto

La statistika oficejo de l' "Internacia Radio-Asocio" publikigas la statistikon de tiuj radiostacioj, kiuj ĝis mezo de novembro 1927 prezentis esp-aĵojn. Nove aliĝis depost marto 1927 jenaj stacioj: Freiburg i. B., Ŝanĥajo, Krakovo, Odessa, Bratislava, Brno (Brünn), Leamington, Pori (Finnl.), Bordeaux, Eskilstuna, Karlstad, Dancig, Kallundborg (Danio), Bergen, Huizen (Ned.), Brisbane, Adelaide, Wellington (du stacioj). Per tio la nombro de l' stacioj, kiuj ĝis nun sendis en aŭ pri esp., kreskis ĝis 149, kiuj dividiĝas je 32 ŝtatoj. En Azio estas

tri ŝtatoj kun 10 stacioj, en Aŭstralio 2 ŝtatoj kun 10 stacioj, en Ameriko 5 ŝtatoj kun 26 stacioj, en Eŭropo 23 ŝtatoj kun 103 stacioj (Sovetio dividiĝas je du kontinentoj).

Notu kaj utiligu: La radiostacio Komintern en Moskvo disaŭdigas en esperanto ĉiudimanĉe je 9-a h., lunde je 23.30 h. k. sabate je 23.30 h. (MET).

Informu pri aŭdebleco al: Moskvo, Poŝtkesto N. 701, Centra Oficejo de Ligilo ĉe SEU.

Ĉu nova blufo, ĉu nova intrigo . . .

El Nederlando k. Germanio oni informis nin, ke idistoj faros en ido — ne pri ido — paroladojn pri Sovetio ĉe la Radiostacio Komintern.

Kiel ili povis atingi tion, ni ne scias. Ni tre miras, ke niaj Moskvaj K-doj ne informis nin pri tio. Ĉu ni staras antaŭ nova blufo, nova intrigo de la fuŝistoj de la mondlingva movado? Kiam la idista movado skisme tute disfalas, la nova intrigo de kelkaj idistoj povas celi nur subfosi nian movadon, sen ia espero de ilia flanko atingi ion pozitivan. Por helpi al la K-doj en ilia eventuala batalo kontraŭ idistoj, ni publikigas ĉisupre statistikon pri uzo de esp. ĉe Radiostacioj.

ESPERANTO-SERVO DE SAT

Kvankam dum nur unujara ekzisto niaj laboroj bone progresis, ili ne tute povas kontentigi nin. Rilate al utiligo de nia materialo ni tre kontentas, sed des pli ni malkontentas, ĉar ankoraŭ ne trafas la centrejon sufiĉe da interesaj kaj valoraj raportoj individuaj; pleje ni ricevas nur tradukojn. Esperanto-Servo ne estas gazeto, sed peresp-a aparato, kiu liveru al la specialaj gazetservantoj en ĉiuj regionoj raportojn originale verkitajn, t. e. raportoj pri iuj okazintaĵoj, viv-cirkonstancoj, laborkondiĉoj ktp. de unuopaj laboristgrupoj, en laborejoj, kemiaj inventoj (eltrovaĵoj)ktp. Ĉiuj Gek-doj do kunhelpu, kompletigi tiurilate nian aparaton. Speciale mankas raportoj el regionoj malproksimaj de Eŭropo. Same ankaŭ mankas ankoraŭ reprezentantoj en tiuj landoj resp. regionoj. Kelkaj Gek-doj el tie rifuzas plu ricevi la materialon, ĉar mankas laborista gazetaro, aŭ se ekzistas tia gazeto, ĝi ne povas utiligi, ĉar ĝi nur aperas kelkpaĝe kun la plej freŝaj kaj plej aktualaj raportoj. Ĉion tion ni bone komprenas, sed almenaŭ raportoj el tiuj regionoj estas ofte tre utilaj al nia servo. Do, nepre tieaj K-doj sendu al ni raportojn, ĉar per tio vi helpas samtempe la progreson de nia movado en la pli progresintaj landoj eŭropaj.

Centrejo de Esp.-Servo, Gerberstr. 24, Leipzig C 1, (Germanio).

AVERTO

La SAT-anoj el Breslau (Germ.) dum febr. gastigis iun "K-don" Ghinroff, kiu sin ŝajnigis bulgara politika rifuĝinto k. asertis travojaĝi venante de Italio k. Suda Francio, al Polio k. Sovetio. Li posedis nek membrokarton nek Jarlibron, sed mensoge citis SAT-matrikulon de K-do el Marseille! Bonkrede la K-doj el Br. havigis al li manĝojn, tranoktejon k. eĉ monon. Ni avertas niajn K-dojn kontraŭ tiu persono, profitanta de SAT en malhonesta maniero, kaj ni tiuokaze denove atentigas ilin, ke neniu donu facilanime fidon al tiaj profitemuloj. Nepre ĉiam postulu legitimiĝon per la membrokarto kun la marko de l'kuranta jaro! Niaj K-doj, kiuj havas ordigitan membrokarton, pro demandoj pri ĝi dum vojaĝo ktp., ne sentu sin ofendataj.

Al la fervojistaj SAT-anoj!

Post la unua fervojista fakkunsido dum la Lyon-a SAT-Kongreso mi ricevis la taskon, kolekti adresojn kaj interrilati kun la K-doj, kiuj deziras informojn. Kiel fundamenta tasko necesas, ke ĉie ekzistu ĉefgvidantoj de l'Fako kaj perantoj. Tiuj adresoj estonte aperu en la Jarlibro sur aparta paĝo. Dum la venonta Kongreso ni fiksu programon, laboron de nia Fako, priparolu rilatojn kun poŝtistoj kaj tramistoj por eventuala interligo ktp. Dume la perantoj zorgu pri interŝanĝo de raportoj pri salajro, labortempo ktp., ĝis la sindikatoj oficiale akceptos esperanton.

Ĉar la ĝisnuna sukceso post la alvoko ne estis granda, mi denove petas K-dojn, sendi adresojn, por kolekti ilin ĝis la fakkunsido en Göteborg. K-doj, kiuj ne povos ĉeesti la Kongreson, sendu direktivojn aŭ komisiu iun ajn kongresonton.

Max Häckel, 1162, Leipzig S 3, Altenburger Str. 18.

Kiel korespondu sovetianoj al Hispanio

K-do 11 229 sciigas nin, ke la cenzuro haltigis la leterojn al li senditajn de Sovetio. Li proponas, ke la sovetiaj K-doj serĉu perantojn ekster Sovetio, kiuj komuniku la leterojn de Hispanio al Sovetio kaj inverse. Por la leteroj el Sovetio la peranto nepre bezonas novan koverton, por ke ili povu eniri Hispanion. (La poŝtm. kompreneble devas pagi al la peranto ambaŭ korespondantoj). — Tiuokaze la sama K-do, estante la sola SAT-ano en urbo Valencia, petas, ke oni por lia kuraĝe entreprenita kurso kun 50 lern. alsendu propagandan materialon al adr.: Sociedad Vegetariana Naturista, str. Tapineria 3, 3°, Valencia, Hisp. — K-doj, atentu lian peton!

Korespondemuloj!

Tasko de ĉiuj proletaj esp-istoj, unuavice de SAT-anoj, estas, praktike utiligi nian tutmondan unuec-lingvon en intereso de la ĝenerala laboristmovado kaj de specialaj organizoj. Sed ne utilas, eĉ malhelpas, se vi opinias plej trafe, sendi petojn pro perado de salutaĵoj, serĉado de korespondemaj organizoj, perado de materialo kaj korespondaĵoj ktp. al la centrejo de Esperanto-Servo. En la centrejo nur laboras unu K-do, kaj nur post sia panakira laboro, do plej ofte nur dumnokte. Esperanto-Servo havas sufiĉe gravan taskon, do vi malhelpas bonan funkcion de tiu aparato, se vi ne provas interligiĝi kun alilandaj organizoj pere de alia vojo. Ebloj estas multaj, ja eĉ en "S-ulo" estas speciala rubriko. Do bonvolu konsideri la peton kaj evitu troŝarĝon al centrejo de Esperanto-Servo.

Protesto

Ĉar en "Esperanto-Junularo" kaj aliaj esp. gazetoj aperis sciigoj, ke mi estas ĉefdelegito de "Interniaro" por Kiev, mi deklaras, ke mi havas neniajn ideologiajn interligojn kun la nomita organizo, k. oni nomis min delegito sen mia scio k. konsento.

D. Viktorov-Ĉeĥoviĉ, 5627.

Komunistaj esperantistoj

Senprokraste sendu vian adreson al: K-do Walter Kampfrad, Gerberstr. 42, Leipzig C 1 (Germanio). Laŭeble aldonu legitimacion pri via partianeco, kiun vi certe ricevos de vialoka partiestraro. Eventualajn petojn koncize citu en la sama skribaĵo.

Internacia Ligo de Liberpensuloj

Pro la sintenado de unu reprezentanto, kiu ne sendis la kolektitajn kotizojn k. pro la malbona alfluo de mono lastjare, mi estas devigata ne plu aperigi la gazeton "Liberpensulo" k. ankaŭ likvidas la organizon. Mi petas la iamajn membrojn, ke ili subtenu min ĉe la forigo de la presŝuldoj. Kiuj deziras informojn liberpensajn de mi, bonvolu enmeti respondkuponojn aŭ poŝtmarkojn. Malnovaj n-oj de "Liberpensulo" ankoraŭ estas haveblaj senpage. Pri sukcesoj de esp. en ateistaj rondoj estos informata estonte en "S-ulo".

Kurt Hubricht, Mariannenstr. 22, I, Leipzig (Germ.).
Poŝtĉek-konto 43 808.

Liberpensuloj, laboru en la kadro de SAT! Starigu fakon!



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Tra Aŭstrio. Ilustrita prospekto, eldonita de l' Aŭstria Ministerio por komerco k. trafiko en Wien. Havebla senpage ĉe: Oesterreichisches Verkehrsbureau, Wien I, Friedrichstrasse 1.

Za vsjeobŝĉym jazykom, tri vjeka iskantij, de E. Drezen. Ŝtata Eldonejo, Moskvo 1928, 265 pĝ.

Ne plu estas haveblaj libroj pri historio de internacia lingvo. La antaŭmilitaj eldonaĵoj estas elĉerpitaj. La nuna ruslingva historio — laŭ nia scio — estas la unua postmilita, kiu koncize raportas pri ĉiuj projektoj (ne lingvoj!) aperintaj ankaŭ post la milito. Ke la aŭtoro konkludas favore por esp-o, estas tute evidente. Esp-o fariĝis lingvo, la aliaj estas nur senvivaj projektoj! Tre rekomendinda libro! S. G. K.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Ziemia Lubelska, Lublin, n-o 10, Koop. movado en Anglio.

Enhavis artikolojn pri esp. k. SAT:

Daily Herald, London, 27. 2., Svenska Järnvägstidningen (Fervoja Gazeto), Stockholm, 11. 1.

Enhavis trad. el esp. art. k. leteroj:

L'Ecole Emancipée, Saumur, 26. 2.; Sächs. Arbeiter-Zeitung, Leipzig, 25. 2.; Die Rote Fahne (Ruĝa Standardo), Wien, 24. 11. 27, 25. 12., 14. 1. — 9 sovetiaj ĵurnaloj krom la en antaŭaj n-oj jam menciitaj represis salutlet. de aŭstriaj organizoj kaŭze de 10-jara datreveno.

NIA POŜTO

5241. — Via versaĵo alvenis tro malfrue por esti uzata okaze de la Virina Tago. — Pri "S. R." vi legu aŭ relegu la noton en n-o 175 de "S-ulo".

Stelo. — Viaj du versaĵoj estas brava laboro! Ni utiligos okaze en "S. R." aŭ "Lern.".

5281. — Loko absolute mankas por via bon-intenca artikoleto.

11 229. — Pri via kurso legu en n-o 179. Petojn pri materialo ktp. vi devas meti kiel pagata anonco (v. tarifon); memoru por estonto. La ceteron trovu en tiu ĉi n-o.

Nordano. — En Kabe vi povas trovi difinojn pri la de vi cititaj vortoj. Loko tute mankas por detale pritrakti tiujn prilingvajn demandojn.

246. — Ni utiligis vian artikolon, sed la bildo ne taŭgas por enmeti.

Lorentson. — Vian manuskripton ni ricevis. Loko mankas; cetere la temo ne plu estas aktuala.

NEKROLOGO

En Manfort (Germ.) mortis la 20. 2. nia K-do

Ernst Fischer (2171)

je ftizo. Honoran memoron al li!

K · O · R · E · S · P · O · N · D · A · D · O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

Ĉeĥoslovakio.

K-do Karel Ŝtêrba (modelisto), Hroubovice u. Chrasti, dez. interŝ. PI, bfl., PM. (rek.), kĉl. Nepre resp.

Francio.

K-do J. Wutte, Oberbetschdorf (Bas-Rhin), dez. koresp. k. Gek-doj el Francio ĉe kiuj mi povus pasigi la paskajn festo-tagojn.

— 6 komencantoj de nia grupo dez. koresp. kun komencantoj. Resp. garantiata. Adr.: Groupe espérantiste ouvrière 5 rue du Réservoir, Orléans (Loiret).

Germanio.

K-do Oswald Scholz, Linicherstr. 28, Alsdorf b. Aachen, dez. koresp. kĉl. L, PI, bfl. Certe resp.

K-do Fritz Giese, Bischofswerda i. Sa., dez. koresp. kun gelernantoj el ĉl. pri div. temoj. Mi estas 17 jaraĝa. Resp. garantiata.

K-do William Bierbaum, Rudolfstrasse 11, Chemnitz i. Sa., dez. interŝ. L, PK, PI, PM, kĉl.

K-do Gerhard Bräuer, Amrastr. 51, Eisenach i. Th., dez. interŝ. PI, bfl., PM. Resp. garantiata.

Hispanio.

— Juna K-do dez. koresp. nur kun gesovetianoj. Adr.: Celestino Lucas, str. Cabras, 13, Barcelona.

Sovetio.

K-do Theodor Malcev, Verejskaja 40, kv. 10, (studento-arkitekturisto), Leningrad—13, dez. kor. kĉl. pri art. demandoj, precipe pri arkitekturo. Resp. garantiata.

K-do B. Ŝtivelman, Pleĥanova 83, Nikolaev, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

K-do V. Belogorcev, Pleĥanova 83, Nikolaev, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Peras en koresp-ado.

— Grupo de lernantoj, 2-a Rajbiblioteko, Nikolaev, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

— Lab-istoj de ŝipkonstrua fabriko, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, pref. kun kulturparti- organizoj k. kolektivoj. Adr.: Nikolaev, Zavod, "A. Marti", Esperanto.

— Grupo de gejunuloj ĉe la klubo "Krasnij Oktjabr", Ĉita, I (Siberio) dez. koresp. pri aktualaĵoj el la lab. vivo kĉl., L, PK, PI.

K-do Nikolao Necenko (fervoj-teknikisto), Novosovetskaja str. 365/44, Samara (Volgo), serĉas seriozajn koresp-antojn pri div. temoj kĉl.

— **Junaj Komunistoj!** La 10—14-an de marto okazas nia rajona (distrikta) konferenco de junkomunistoj, estas dezirate ricevi salutleterojn, por montri la utilecon de esp. Sendu multnombre! Adr.: Kamenskoje, Dnepropetr. okr., Arseniĉeva str. 31/2, "Labesko" por JK.-Konferenco.

Svisio.

K-do R. Bacher, 87, rue de Tarange, Ĝeneve, dez. koresp. pri etnografio, kutimoj, kredoj, moroj de ĉ. popolo en la mondo, socialaj temoj k. interŝ. PM. Resp. garantiata.

ALVOKO

K-do Gàspar Vilmos (SAT-ano 1644), sciigu al mi vian restadlokon k. venu Antverpenon tuj, se vi dez. ŝipiradi. Sancoj dum marto k. aprilo. — Liaj konatuloj bonvolu atentigi lin pri tiu ĉi anonco. Li estas hungaro k. restadas nun supozeble en Jugoslavio.

Adr.: **Jozefo Porĉin, Ankerrui, 20, Antwerpen** (Belgio).

GEJUNULOJ ĈIULANDAJ, ATENTU!

Samara fervojista gekomjunularo depost 1. 3. 28 komencas longdaŭran laboron por bone organizi k. fortikigi sian intern. korespondadon kun gejunularo, precipe kun komjunularo k. ruĝfrontbatalantoj de ĉiuj landoj (aparte kun komjunularo de Bavario protektata de nia).

31. 3. en Samara okazos fervojista komjunul-konferenco, en kiu i. a. ĉiu komjunul-ĉelo devas raporti pri sia intern. koresp., k. la konferenco praktike komparos, kion oni povas gajni per nacilingva k. per esp. korespondado.

Bonvolu helpi al ni propagandi esp., tuj sendu priskribon de stato, vivo k. laboro de gejunularo, komjunularo, ruĝfrontbatalantaro de via lando, loko, urĝe sendu de viaj nomitaj organizoj salutlet. al la konferenco.

Responde vi ricevos samon. Adr.: **USSR, Samara, Leo Tolstoj 94, ĵeleznodoroĵnij klub, por Komsomol.** Komisiite de SEU-ĉelo, **B. Ĵeleznjakov,** 5583. Respondo garantiata.

Por la **8-a Kongreso de "Fédération Espérantiste Ouvrière"** paŝkon en Bourges sendu komunikojn k. salutleterojn al: Laborista Esp. Grupo, 8, place Malus, Bourges (Cher), Francio.

SAT-edukistoj nesovetiaj, kunlaboru al serioza ped-servo per artikolo ĉiumonata pri instruista gravaĵo. Mi nepre respondos per vasta monata informaro presita k. maŝinskribita. Adr. **Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans** (Francio). !

Atentu Tutmonda IRH-anaro!

La 18-an de marto estas grandega festo de "Internacia Ruĝa Helpo" — ĝia kvinjara jubileo. Ne forgesu ĉi tiun tagon, ĉar Leningrada esp-istaro tre aktive partoprenas ĝin. Sendu salutleterojn de div. IRH-organizoj, lab. k. politikaj organizoj. Skribu al adr.: **USSR, Leningrad, Smolnij Ruĝa Helpo, Esperantista Sekcio.**

ATENTU!

Fine de marto en Sverdlovsk estos Urallanda Konferenco de komjunularo. Tutmonda junularo sendu salutleterojn al la Konferenco. Adr.: **Sverdlovsk, Pervomajska 8, kv. 5, Urallanda Komitato de SEU.**

ATENTU!

Distrikt-Komitato "MOPR" (IRH) k. Distrikt-Komitato de virinoj serĉas konstantajn gekoresp-antojn, ĉu kolektivajn, ĉu individuajn, organizojn, ĉelojn ktp. por interŝanĝo k. informado pri "MOPR" k. virina movado en ĉl. — Ni atendas salutojn por la 18-a de marto.

Adr.: **Barnaul, Okraj Kom, "MOPR".**

ENHAVO:

	pago
La Pariza Komuno	187—88
Mortinto de la hungara Proletaro	188
Antaŭ la balotoj en Polio	188—89
La superregado de l' Dolaro . . .	189
Notoj el Britio	189
La Dürer-jaro Nürnberg 1928 . . .	189
Mia vivo kaj buĝeto	190
Patriotismo — Internaciismo — Sennaciismo	190
Sennaciula Studenta Paĝo	191
Tra Esperantio	192—94
Korespondado, anoncoj	194

Presejo: Uns-Produktivgenossenschaft, Leipzig (Germanio)